M. 15115:1.

(översättn. 1 sida)

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Holland

uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

79 Holland

Rotterdam, la 5-an de Aŭgusto 1952.

Al:
La Etnologia Arkivo
de la Universitato de Lund
Finngatan 8
L u n d
S V E D U J O .

M.15115:1

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

Estimataj Sinjoroj,

Sekve de viaj demandoj pri "La Buĉado de Ĉevaloj", kiujn mi legis en la maja numero de "Revuo Esperanto Internacia", mi sendas al vi la jenajn respondojn, kiujn mi ricevis de: S-ro W.A. de HAAN, veterinaro, loĝanta Lessinglaan 104 en Utrecht (Nederlando), sekretario de la "Asocio por Veterinara Medicino":

1. En Nederlando la ĉevalviando jes estis kaj estas konsumata kiel nutraĵo, sed ĝenerale la nederlanda popolo estas sufiĉe malakcepta rilate al la konsumado de ĉevalviando. Granda parto el la nederlanda popolo neniam manĝas ĉevalviandon, aŭ manĝas ĝin nur en speciala formo, ekzemple kiel fumaĵitan viandon.

2. La mortigo kaj buĉado de ĉevaloj en Nederlando okazas, kompare al la buĉado de bovoj, ŝafoj kaj porkoj, en sufiĉe limigita grado(proporcio). La buĉadon de ĉevalo oni tamen ne konsideras kiel socian hontigon. La mortigo de hundoj kaj katoj kaj la konsumado de la viando de ĉi tiuj bestoj praktike preskaŭ ne okazas.

3 En Nederlando ne estas aŭ estis specialaj personoj, kies tasko estas la buĉado de ĉevaloj. Je tiom, kiom hundoj kaj katoj estas mortigataj por buĉado, ĉi tio lasta efektive okazas pere de specialaj personoj.

4. La mortigo de ĉevaloj okazas laŭ la sama maniero, ~~kia~~ kiel okazas la mortigo de aliaj buĉotaj bestoj, t.e. ke svenigo okazas antaŭ la tratranĉo de la kolo.

Mi ne povis sendi la respondojn al vi pli frue, ĉar mi mem ricevis ilin ne pli frue. Malgraŭ tio mi esperas, ke ili povu utili al vi kaj se vi deziros ankoraŭ pliajn aŭ pli detalajn informojn, mi petas vin, turnu vin al mi kaj mi helpos vin laŭ mia plej bona kapablo.

Kun koraj salutoj,

J. Th. de Goeij

J.Th. de Goeij
Luzacstraat 21a
Rotterdam - C.
Nederlando.

Holland

M. 15115.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

På grund av Edra frågor rörande "Buĉado de Ĉevaloj" som jag läst i majnumret av Revuo Esperanto Internacia sänder jag till Eder följande svar, vilka jag fått från W.A. de HAAN veterinär och boende Lessinglaan 104 i Utrecht (Nederländerna) sekreterare i veterinärförbundet.

1. I Holland har hästkött konsumerats som föda och gör det fortfarande men i allmänhet vill det holländska folket inte acceptera hästkött. En stor del av det holländska folket äter aldrig hästkött eller äter det blott i en speciell form, ekempel som rökat kött.

2. Dödande och slaktande av hästar äger i Holland - i jämförelse med slaktandet av kor, får och svin - endast rum i viss begränsad grad. Slaktandet av häst betraktar man i varje fall icke som en social vanära. Slaktandet av hund och katt och konsumtion av kött från dessa djur äger praktiskt taget ej rum.

3. I Holland finns det inte och har icke funnits någon särskild person, vars uppgift är hästslakt. I den grad hundar och katter har dödats genom slakt har detta verkligen skett av en särskilt utsedd person.

4. Dödandet av hästar har ägt rum på samma sätt som dödandet av andra djur, avsedda för slakt, d.v.s. bedövning har ägt rum före uppskärningen av halsen.

Jag står gärna till tjänst med ytterligar upplysningar, om sådana önskas.